



*kreketo en la
Marsejla regiono*

esperanto

Provence

n° 100 - printempo 2015

kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio

federacia retejo

www.esperanto-provence.org

nia federacio sur Facebook

[www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

06 76 55 57 23

nlpolecamp@gmail.com

baza kotizo por aliĝo

(kun gazeto) : 6 €

ĉeko al :

"Espéranto- Provence"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la

kasisto

Nicole Lafitte

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

nlpolecamp@gmail.com

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain

61 Montée du Castelar

83460 Taradeau

06 42 19 68 51

p.vilain83@orange.fr

limdato por sendo de

publikotaĵoj por la venonta n°

25a de Junio 2015

bonvolu sendi al la supra retadreso

antaŭdankojn pro viaj kontribuoj



Vorto de la Prezidanto...

Dum nia ĝenerala kunveno en *Les Issambres*, kiu perfekte disvolviĝis, ĉar ni estis multnombraj, ni trovis solvojn por pluraj malfacilaj eroj de la tagordo.

La nova teamo tuj ekagis, por ke nia Provenca movado fartu bone.

La printempo komenciĝis per pluraj intereseĝaj okazaĵoj : vizitoj de samideanoj el Rusio kaj Taĝikio en *La Ciotat*, *Le Beausset* kaj *Marseille*. Tiaj renkontoj vekas la scivolecon de la publiko en la ĉirkaŭaĵo de niaj kluboj.

Aldone al tio, la Marsejla «Semajno pri Esperanto», fine de Majo, estos plia ekzemplo de la vicleco de *Espéranto-Provence*.

Mi tutkore deziras bonan printempon al ĉiuj !

Pierre Oliva

... kaj de la redaktoro

Kiam naskiĝis nia gazeto «*Espéranto-Provence*» ?

Mi malfacile retrovis spurojn pri ĝia kreado, sed tamen retrovis memoraĵojn danke al *Micheline Château*, el la Nacia Esperanto-Muzeo de *Gray*, kiu disponigis al mi, je mia peto, kelkajn frontpaĝojn de iamaj ekzempleroj (numeroj 3 – 10 – 20 – 30 – 67 – 68 : vidu la fotojn sur la frontpaĝo).

Bedaŭrinde, mi ne povis havi la numeron 1, sed ĉar mi ricevis la 3an, kiu aperis en Januaro 1989, mi supozas ke nia federacio kreis sian gazeton en 1988. Ĝi tiam nomiĝis «*Provence-Espéranto*». Kiu redaktis ĝin ? Mi ne scias.

La redaktoro de la n° 30 (Oktobro 1995) estis *Jean-François Bouveron*. Ĉu ankaŭ *André Loisel* tiun taskon plenumis ? Tiu de la n° 67 (printempo 2007) : *Céline Bernard*, kaj la gazetnomo ŝanĝiĝis : «*Espéranto-Provence*». Poste sekvis en la redakto-posteno (sed eble mi forgesas nomojn, kaj donas ilin ne je la ĝusta ordo) : *Patrick Lagrange*, *Jean-Claude Roget*, *Renée Triolle*...

De ŝi mi transprenis la laboron en Januaro 2012, por la n° 87.

Nun estas en viaj manoj, aŭ sur via komputilekrano, la numero 100. Mi profitas la okazon por varme danki ĉiujn iamajn redaktorojn, ĉiujn enpaĝigintojn (kaj aparte *Bernadette Deschanel*, kun kiu mi havis la plezuron labori), ĉiujn asocieresponulojn kaj ĉiujn regulajn aŭ fojfojnajn kontribuintojn, kiuj vivigis nian gazeton de la n°1 ĝis tiu ĉi n°100.

Kaj jen sekvas peto, espero : eĉ se nur simbole, ĉu ne estus plaĉe "fanfaroni" pri alia "cento" ?

Ĝis nun aniĝis al nia federacio 92 personoj. Ĉu ni ne provu atingi la nombron 100 ?

"100 membroj por la 100a gazetnumero !"

Cetere, antaŭ kelkaj semajnoj, mi permesis al mi sendi la jenan retmesaĝon al tiuj, kiuj ankoraŭ ne membriĝis por la jaro 2015 :

«Ĉu ankaŭ vi ŝatus pagi vian aliĝkotizon ? Por tion fari, estas tute facile : necesas sendi ĉekon de 6 €, je "Espéranto-Provence" al nia nova kasisto :

Nicole Lafitte - Eden Parc 99 - 2772 Montée du Vieux Camp - 83330 LE CASTELLET

Mi sendas ĉi tiun peton ankaŭ al esperantistaj paroj : se vi jam pagis nur unu kotizon, ankaŭ dua pago helpus nin atingi triciferan nombron !

Bonvolu tamen memori, ke vi estas tute libera neglekti mian aliĝpeton kaj tiam pardoni al mi mian trudon.»

Sed ve... ĉu mi estis tro naiva ? Venis nur unu plia aliĝo, kaj ne kulpas la lingvo uzita, ĉar mia mesaĝo estis dulingva. Do, la 91, je la dato de mia mesaĝo, iĝis 92... mankas 8 membroj por atingi la simbolan centon...

Pri la federacia TTT-ejo

Ĉu vi jam vidis, ke *Franz Mimmersheim*, kiu zorgas pri la federacia TTT-ejo, modernigis ties aspekton ?

Profitu la okazon por pli ofte kaj regule viziti ĝin, kaj eĉ kontribui, se tion vi emus (adreso en la frontpaĝa kolofono).

Pri tiu TTT-ejo nia, oni reklamis sur la reto. Kie ?

- Pensée Libre / Les amis d'André Arru : «Sur le site *Espéranto-Provence*», la 7an-12-2014

Penselibre.org/spip.php?article874

- Fukushima-information, la 9an-1-2015

www.scoop.it/fukushima-information

Federacia agado

Kunvenis kelkaj membroj

La membro-kunveno de nia federacio okazis en Les Issambres la 8an de Marto. Ĉeestis 22 membroj kaj 11 sendis rajtigilon. Normale, ĉiuj membroj ricevis la protokolon, ĉu retmesaĝe ĉu poŝtletere. (Se ne, bonvolu tion sciigi al la sekretario.) Okazis kelkaj modifoj en la listo de la komitatanoj kaj estraranoj, kaj la federacio, laŭ propono de *Thierry Spanjaard*, elektis sian markemblemon, jam videblan sur la gazeta frontpaĝo.

Ĵus okazis...

Printempas Esperanto en nia regiono

Hazarde de la turneoj, invititoj de *Espéranto-France*, kiuj rondvojaĝas tra la lando, estis en Provenco du sinsekvajn semajnojn ! Kvankam ambaŭ venis el eks-Sovetunio, ili prelegis pri tute diversaj temoj.

Kiel kutime la grupo *Espéranto-La Ciotat* estas la ĉefkunordiganto, kvankam niaj gastoj vizitis Marsejlon kaj prelegis en *CIRA*, kaj ankaŭ vizitis la turismoficejon de *Le Beausset*, kiu subtenas Esperanton. Vizito de *La Ciotat* estis ĝenata de pluvo kaj poste de ventego.

Aleksandro Melnikov estas membro de la Akademio de Esperanto, dufoje doktoro pri lingvistiko (*Minsk* 1990 kaj *Ĉeboksari* 2004), verkinto de pluraj eseoj aŭ lernolibroj, scienca konsilanto.

Tamen ne tiuj temoj estis elektitaj por publika prelego sed "La krizo en Ukrainio laŭ vidpunkto de rusoj kaj ukrainoj".

Evidente ĉefis la vidpunkto de rusoj, dum *Renée Triolle*



Aleksandro Melnikov,

provis rebati pri la fotita okazo de la M.E.S. en Les Issambres ukraina. Ĉar post demonstracioj en *Maidan* forfalis la oficiala registaro, Ukrainio retroviĝis en plena anarkio kaj la Krimeanoj voĉdonis por stabila reĝimo kaj reiro al Rusio, kiun traktato de 1783 ligas "ad vitam eternam". La ukrainoj estas nur faŝistoj kaj *Melnikov* montris plurajn ĉitemajn fotojn, referencis al *Bandera*, kiu dum la dua mondmilito buĉis milojn da homoj, sed ĉar lia moto estis "Ukrainio al ukrainoj", ĝi fariĝis la nuntempa kaj *Bandera* oni glorigis. Plurfoje *Melnikov* atentigis nin, ke li estis edukita en Sovetunio, do ne kutimas kredi tion, kion montras la amaskomunikiloj, sed li estas komplete kaptata de la oficiala aliro al la krizo. Liaj argumentoj estas, ke se vere rusoj invadus la orientan parton de Ukrainio, la spionaj satelitoj de Usono tion vidus.

Kulpegas Usono kaj *CIA*, kiuj instaligis bazojn de *OTAN* ĉe la landolimo kun Rusio. Pri la detruo de 10 000 infrastrukturoj (pontoj, fervojoj, malsanulejoj, lernejoj ktp.) evidente kulpas la ukrainoj (male miaj fontoj diras, ke ukrainoj, sciante, ke mankos mono por rekonstrui, zorge evitis detruoj). Tamen interesaj vesperoj la 24an de Marto en *Marseille* kaj la 25an en *La Ciotat*, kun multaj interŝanĝoj, interrompoj kaj kompletigoj.

Firdaŭs kaj Svetlana Ŝukurov venas el Taĝikio, el la ĉefurbo Duŝanbo, kies nomo devenas de la vorto "lundo" ĉar tie okazis semajna bazaro. Li instruas matematikon kaj informadikon en la universitato dum ŝi estas arkeologo kaj kunordigas programojn de restaŭrigo en la Ministerio pri Kulturo. En *La Ciotat*, ŝi montris fotojn de ruinaĵoj, kiuj datumas de la bronzoperiodo aŭ urboj konstruitaj de Aleksandro la Granda (320 antaŭ Kristo) kaj komentis en la rusa. Tiu malgranda lando (unu kvarono de Francio) estas ĉefe monta : 4 pintoj superas 7000 metrojn kaj niaj gastoj havis problemojn al kutimiĝi al altitudo nulo ĉe Mediteraneo ! Taĝikio provizas akvon al la tuta Meza Azio, kaj havas problemojn kun Uzbekio : la riveroj *Amu Daria* kaj *Sin Daria* akvumas la kotonkampojn en Uzbekio, kiu reciproke ne volas liveri senpagan gason! Post forfalo de Sovetunio, retiriĝis granda parto de la rusoj (de 80% al 20 % en Duŝanbo), kiuj estris la ĉefajn postenojn, kaj nun alvenas la ĉinoj por instali entreprenojn, konstrui infrastrukturojn por la turistoj aŭ komerci, kiel ili ĉiam faris sur la Silka Vojo.



Firdaŭs kaj Svetlana Ŝukurov

La taĝika lingvo venas de Irano kaj similas al "farsi", ĝi skribiĝis per arabaj karakteroj, dum 10 jaroj inter 1929 kaj 1939 per latinaj kaj de tiam per cirilaj. Modo puŝas al lernado de la angla (ekz. en ŝika turka lernejo) dum la rusa restas uzata de la tuta loĝantaro. *Firdaŭs* kaj *Svetlana* bedaŭris, ke ili ne povis montri filmon en Esperanto, sed estis tro da materialo aŭ nesufiĉe da tempo. En *La Ciotat* sekvas ĉiam amika trinkado kaj tiam venis al ili demandoj en la rusa, en la angla, en la franca, en Esperanto.

Informado estis farita per afiŝoj en publikaj lokoj, vendejoj, invito sur lumaj urbaj paneloj aŭ en "*La Provence*".

raportis R.Triolle



Prochainement... / Baldaŭ okazos...

Semaine de l'espéranto

L'association Espéranto-Marseille, sous l'égide de la fédération Espéranto-Provence, organisera une « Semaine de l'espéranto » à Marseille, du 28 au 31 mai. Le lancement de cet événement a eu lieu le 2 avril à l'Équitable Café (54 Cours Julien – 13006 Marseille), où se déroule un café linguistique le 1er jeudi de chaque mois à partir de 18h.

infos : esperanto.marseille.over-blog.com

programme

jeudi 28 mai – 18 h - CIRA, 50 rue Consolat, 13001 Marseille - (Métro et tram : Réformés)

Introduction à l'Espéranto : Pourquoi l'espéranto ? Origines, histoire...

Mini cours : les bases de l'espéranto.

Conférence "Quelle(s) langue(s) pour l'Europe ?" par Pascal Vilain - débat

Rafraîchissements

vendredi 29 mai – 18h - Cité des Associations, 93 La Canebière, 13001 Marseille - (M°: Noailles et tram : Canebière Garibaldi)

Introduction à l'espéranto : culture espérantiste, musique, danse, etc...

Mini cours : les bases de l'espéranto.

Films sur l'espéranto et en espéranto (traduction en français) - débat

Rafraîchissements

samedi 30 mai - Greendeliss, 11 avenue du Maréchal Foch, 13004 Marseille
(M° et tram : Cinq Avenues Longchamp)

11 h - Atelier pour les enfants : jeux, chants, contes. Pour les parents, présentation des rencontres pour enfants et adolescents dans le monde espérantiste.

13h - Déjeuner Greendeliss : bio et locavore.

14h - Atelier de préparation de maki (sushi).

(P.A.F. : 5€ - conso obligatoire)

dimanche 31 mai – 11h - Jardin du Pharo, boulevard Charles Livon, 13007 Marseille

en cas de pluie : Brasserie du Pharo, 2 avenue Pasteur (au coin du bd. Charles Livon), 13007 Marseille

Introduction à l'espéranto : associations espérantistes et principaux congrès et rencontres.

Mini cours : les bases de l'espéranto.

Pique-nique (apportez un plat à partager) et échanges sur l'espéranto.

Balade : jardin du Pharo, Fort Saint Nicolas, Abbaye Saint-Victor.

du 26 au 30 mai - Cité des Associations, 93 La Canebière, 13001 Marseille

(M°: Noailles et tram : Canebière Garibaldi)

Exposition : l'espéranto, solution aux hégémonismes linguistiques par une langue simple, universelle et équitable.

informis : T.Spanjaard

FEI-ekzameno

Ekzamensesio por la 1agrada ekzameno de Franca Esperanto-Instituto okazos en Marsejlo la dimanĉon 14an de Junio je la 9a. / *Examen d'espéranto : l'examen du 1er degré de l'Institut Français d'Espéranto aura lieu à Marseille le dimanche 14 juin à 9 heures.*

loko / lieu : *Interlling 9,13 rue Bel-Air (6ème) - metroo / métro : Estrangin aŭ / ou Cours Julien aŭ / ou Castellane*
parkejo / parking : *Préfecture*

skriba parto je la 9a / *écrit à 9 heures* - vidu la programon kaj provekzamenojn / *programme et annales* :

www.franca-esperanto-instituto.net

parola parto tuj post korektado de la tasko, do ĉirkaŭ la 10a (*20 minutoj por ĉiu kandidato*) / *oral après correction, soit vers 10 heures (20 minutes par candidat)*

aliĝkostoj / *frais d'inscription* : 8 € (senpage por la membroj de Esperanto-Provence / *gratuit pour les membres d'Espéranto-Provence*)

necesas sin anonci / *inscriptions auprès de Renée Triolle* : triolle.renee@wanadoo.fr

El niaj federaciaj asocioj



04 - E.K.E.M. - Esperanta Kulturo en Manosque

L'Assemblée Générale de l'association a eu lieu le 17 janvier 2015. Un nouveau bureau a été élu :

président : Jean-François Bettus - jf.bettus@hotmail.fr

secrétaire : Clément Fausser - clement.fausser@gmail.com

trésorier : Joseph Grammatico - josephgrammatico@neuf.fr

Cette année, EKEM sera présent à la Maison des Associations de Manosque toute la journée des premier et troisième samedis de chaque mois à partir de 9h45. A midi : repas tiré du sac.

Contacts : 04 92 72 39 89 ou 04 86 90 24 97 (On est prié de s'annoncer sans attendre la veille.)

Correspondance internationale

A Manosque, au dernier trimestre 2014, une correspondance en espéranto s'est établie entre une classe CM2 et une du Japon. Les échanges dépendent des vacances, des cycles scolaires, du temps consacré dans les deux pays... ce qui provoque d'assez longs délais et des impatiences. Mais quels plaisirs et quelles leçons quand la lettre arrive avec la découverte de l'autre, de son pays, et quand les élèves ont ainsi la possibilité de vérifier concrètement l'utilité de l'espéranto !

Autre expérience : pendant le premier trimestre 2015, dans le cadre des TAPs (Temps des Activités Périscolaires), une vingtaine d'élèves de Ste Tulle (5 km de Manosque), en deux groupes CM1, ont découvert l'espéranto. Au cours de séances d'une heure par se-

maine, des petites affiches ont été constituées (se présenter, dire comment vivre ensemble, communiquer, parler de son environnement, poèmes (en espéranto) de Paul Éluard (nom de l'école). Une lettre et les affiches sont parties vers une classe de Lituanie. Grâce à l'espéranto, encore un riche échange pour de meilleures connaissances et intercompréhension. "Espéranto Manosque" a offert à chaque élève, en félicitations pour les efforts et la bonne participation, "L'imagier" ou le "Saluton !" fournis par le "libro-servo" de "Réinsertion et Espéranto".



informis J.F.Bettus



13 - Esperanto - La Ciotat

Reĝa kuko

Ĉiujare revenas tiu tradicia festo, kiun la esperantistoj de *La Ciotat* elektas por la ĝenerala membro-kunveno. Kvankam *Espéranto-La Ciotat* ne estas asocio sed funkcias kiel anteno de *Espéranto-Provence*, ni tamen havas membro-kunvenon. Ĉefa konstato estas manko de novaj lernantoj, eĉ se la klubo estas bone konata kaj aprezata pro sia kontribuo al la asocia vivo kaj propono de interesaj agadoj (venigo de prelegantoj ĉefe, sed ankaŭ ekz. enketo pri aborto tra la internacia lingvo). *A.Rémy*, la tramonda biciklanto, vintras en la regiono kaj fariĝis reĝo.

Journée Mondiale de la Langue Maternelle

A l'initiative de l'UNESCO qui tire la sonnette d'alarme, Espéranto-La Ciotat s'associe à cette journée. Sur les 6000 langues dans le monde, un bon tiers est en danger



pour des raisons bien identifiées : la langue ne se transmet plus en famille ou reste cantonnée à des usages domestiques. Les locuteurs ont perdu la fierté de leur langue et les pouvoirs publics la rabaisent à un rôle de dialecte ; la langue s'adapte mal aux nouveaux médias ou aux nouvelles technologies ; il n'existe pas de matériel d'enseignement dans la langue en question. Le nombre de locuteurs est faible. Les exemples historiques ne manquent pas : plus de 280 langues indiennes ont disparu des États-Unis depuis l'arrivée de Christophe Colomb ; les langues régionales en France ont disparu comme langues maternelles suite à l'enseignement obligatoire en français ; mais le rythme s'accélère avec l'utilisation d'Internet . Même si l'espéranto est la langue maternelle d'enfants nés dans des couples binationaux, il est généralement une langue apprise. Alors pourquoi se sent-il concerné ?

La Directrice Générale de l'UNESCO, Irina Bokova, met le doigt sur la nécessité de connaître trois langues : sa langue maternelle (la seule qui soit efficace pour l'alphabétisation et la formation de la personnalité), la langue de l'État dans lequel on vit et une langue internationale.

Pour certains, ce schéma se réduit à une seule langue, avec tous les manques que cela entraîne ou la situation de privilégiés que cela crée.

Le 21 février, au Grand Portique à La Ciotat, une soirée amicale a réuni espérantistes et non-espérantistes qui ont fait entendre du russe, anglais, suédois, provençal, espagnol, allemand ou échangé leurs expériences personnelles. Le pot de l'amitié reste le meilleur moment pour les échanges.

Les espérantophones ont déjà choisi quelle langue internationale utiliser pour une communication équitable, ils sont donc sensibilisés à la beauté et la valeur intrinsèque de toutes les langues. Ils ont l'exemple des langues régionales qui ont disparu en une génération avec l'enseignement obligatoire. Ils ne veulent pas que le français disparaisse. (R.Triolle)



83 - Esperanto-Klubo Fréjus / Saint-Raphaël

Reĝkuka festo

Kiam nura fotografaĵo kapablas bildigi la bonan farton de asocio, kia la nia, ne necesas skribi longajn frazojn, ĉu ne ?

Tiun ĉi, tamen : 32 personoj, ne nur membroj de la klubo, sed ankaŭ aliurbaj samideanoj, kuniĝis ĉe *Monique* kaj *Pierrot Prezioso* por la tradicia reĝkuka festo, dimanĉon la 18an de Januaro.

Samtage okazis la ĝenerala membro-kunveno de la asocio. (P.V.)



Mediterranea Esperanto-Semajno

L'espéranto, un rêve ? Une réalité ?

Cent stagiaires, dix nationalités ; une seule langue ? Oui, et ça fonctionne.

Qu'est-ce qui pousse tant de gens d'âges et d'horizons différents à se rassembler depuis 9 ans dans ce délicieux coin de côte varoise, une semaine par an, autour d'organisateur passionnés et dévoués que sont les membres de l'Espéranto-Club de Fréjus / Saint-Raphaël ? La réponse est claire : vivre un rêve pendant quelques jours. Qui n'a pas dans sa vie souhaité communiquer avec un inconnu du bout du monde ? Qui n'a pas désiré voir s'écrouler la Tour de Babel ?

L'espéranto permet tout cela et un peu plus : la douceur d'un soleil qui réchauffe l'esprit, un petit pas vers la compréhension d'autrui, une avancée vers un monde débarrassé de la violence et de la haine, vers une sorte d'entente cordiale comme l'avait envisagée Lazare Zamenhof, le polonais créateur en 1887 de la langue internationale, un de ces pacifistes qui permettent d'espérer un avenir meilleur pour l'humanité.

Espérer, la solution à tant de problèmes. Concrètement, comment ça marche ? Ici quatre niveaux de cours, du débutant intégral au locuteur confirmé, de la méthode directe au cours presque magistral sur un thème pointu, en passant par les jeux et les activités de groupe. Et à quelle vitesse ce-la avance-t-il ?



Tiuj ĉi teksto kaj foto estis publikigitaj en Var-Matin la 21an de Marto

À une vitesse d'acquisition insoupçonnée, qui rend caducs les efforts à consentir pour s'exprimer dans une langue étrangère. Les organisateurs de congrès, en tous lieux du globe, ont pour premier et énorme souci celui de l'intercommunication des participants ; les congrès annuels universels d'espéranto

– et celui de 2015, le 100ème, se déroule à Lille du 25 juillet au 1er août – ont ceci de particulier que, même avec plusieurs milliers de participants, avec plus de 60 nationalités représentées, ils ne mobilisent aucun traducteur. Pour les méridionaux dont l'oreille est un peu faite aux sonorités de l'italien, de l'espagnol et du provençal, l'espéranto est d'emblée perçu comme un proche parent. Alors si vous tentiez le cousinage ?

Monique Eysseric, staĝinto el la Langvedoka-Rusiljona Federacio



83 - Espéranto - Le Beausset



En Le Beausset, vizitoj de eksterlandaj esperantistoj kaj uzado de nia internacia lingvo pli kaj pli iĝas kutimo en la Turisma Domo

(R.Triolle. maldekstre kun A. Melnikov, dekstre kun la ge-Ŝukurov)



84 - Centre Culturel Espéranto d'Avignon

La 15an de Januaro, okaze de la monata kunveno, la klubanoj ĝuis la agrablan kutimon partigi la reĝan kukon. Nia reĝino estis nia veteranino *Hélène Gente*. Kaj ni kantis en tre amika etoso : "Samideano, ĝoju ni, trinku ni je via sano !"

La 22an de Januaro, en la Centro ESC, kelkaj klubanoj partoprenis en la tagmanĝo "*Petits plats du monde*". La temo estis "Supoj de la mondo". Ni gustumis ĉinan, marokan kaj italan supojn, ĉiujn bongustegajn. Estis agrabla momento !

raportis R-M. Quintin

La piedmigrado de la Reĝinoj !

«Ĉiam pli alten, ĉiam pli bele !», sed la kvar sepdekulinoj, kiuj flugis al Nepalo komence de Oktobro 2014, havis alian celon : «vidi la montojn de for kaj la homojn de proksime». Nia ĉiĉerono, *Gelbu*, venis al Francio en Januaro por perfektigi sian konon de la franca lingvo, por renkonti vojaĝontojn kaj plani la restadon laŭ iliaj deziroj. Tiel ni decidis resti nur unu tagon al Katmanduo kaj tuj flugi al *Pokhara* por piedvagadi en la ĉirkaŭaĵo de tiu belega urbo, vidvide al la Anapurna Montaro. Per buseto ni supreniris al fora vilaĝeto, *Bhumdi* ; elektro estis instalita tie nur en 2014, ĝi ne estis en nia ĉambro sed en la koridoro kaj nokte ni devis eliri por viziti necesejon instalitan speciale por ni post nia alveno. Bonŝance, kiam ni alvenis estis festo, la junuloj de la diversaj vilaĝoj ludis retpilkon. La vilaĝanoj multnombre venis por kuraĝigi ilin kaj forte aplaudis ! Belege estis vestitaj la virinoj, ili surloke kuiris, vendis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn ; estis amikeca etoso en belega kampara ĉirkaŭaĵo. En niaj pakaĵoj ni kunportis vestaĵojn por infanoj, do ni informis respondeculon. Li proponis al deko da virinoj viziti nian loĝejon je la fino de la festo. Patrinoj venis, ofte kun bebo sur la brakoj, kaj estis same kiel en bazaro. Ili elektis taŭgajn vestaĵojn por siaj infanoj kaj foriris tre feliĉaj.

Por bone vidi la montojn, oni devas frue ellitiĝi, tiam la suno bone lumigas la pintojn kaj ni parkerigis la nomojn... Anapurno I, II, III , Anapurno IV, Anapurno Suda, *Machhapuchhre* pli fronte, *Manaslu* pli for... iam mi diris al *Gelbu*, ke tiu monto memorigas al mi similan ĉe ni kaj mi komencis diri : «*Le Dôme*... kaj tuj li aldonis... *des Écrins*» ! Estis surprizo kaj ĝojo, ambaŭ ni povis rakonti pri grimpadado de ĝi. Piedirante, ni vidis multajn rizkampojn, trairis multajn vilaĝetojn, salutis gelernantojn survoje al lernejo, vizitis la templon de la Paco konstruitan de la Japanoj, trairis belegan arbaron, gustumis lokajn frandaĵojn. Sub varma suno ni malrapide paŝis, ni estis ekster la mondo, ekster la tagaj zorgoj... gravis nur antaŭen iri !

Kial la piedmigrado de la Reĝinoj ? Ĉu nur aludo al la Reĝa piedmigrado ? Imagu : nia grupo havis kuiriston, kiu bonege kuiris, por ke ne manku al ni la fortoj por piedvagadi. Dum la tuta restado, mi opinias, ke ni tre bone manĝis, tre sane, surloke estis aĉetita la nutraĵo.

Krom la kuiristo estis du portistoj, junaj kaj fortaj, kaj nia mirinda ĉiĉerono, ĉiam preta helpi al ni de frumatene ĝis vespere.

Mi mallongigis mian piedmigradon por reiri al Katmanduo kaj viziti esperantistojn. Ĉe la flughaveno atendis min *Esploristo*, junulo kiu iĝis mia ĉiĉerono. Ni tuj vizitis la prezidantaron de la nepala grupo, *Indu Devi Thapaliya*, kaj mi havis la honoron tranokti en la «esperanto-ĉambro» kie jam tranoktis famaj esperantistoj. Poste ni iris al la sidejo, tie mi aŭskultis prelegon pri politiko en Nepalo, tiom da diversaj partioj... kaj daŭre estas problemoj por regi la landon. Estis multe da partoprenantoj kaj mi ĝojis konatiĝi kun ili, kaj revidi konatulojn. La morgaŭan tagon, mi prelegis pri nuntempaj virinoj, kiuj famiĝis en Esperantujo je diversaj kampoj kaj kun kiuj mi persone konatiĝis : *Marjorie Boulton, Katalin Farago, Szofia Korody, Kristin Tytgat, Claude Nourmont, Katalin Kovats, Anna Löwenstein, Franciska Toubale, Mirejo Grosjean, Spomenka Štimec, Barbara Pietrzak, Ilona Koutny, Renée Triolle*. Tio, kion mi ne antaŭvidis... estas, ke partoprenis pli ol tridek viroj kaj nur tri virinoj ! Ĉu bone elektita temo ? Estis interesaj reagoj, unu partoprenanto demandis al mi, kial mi elektis tiun temon ! Noktiĝis kaj iu esperantisto demandis al mi : «Ĉu vi pretas motorciklo por reiri al la domo de *Indu* ?» Mi tute ne pensis pri la terura trafiko, mi rigardis la motorciklon, mi kapablas grimpi sur ĝin do mi simple jesis : je la komenco mi forte premis la dorson de la ŝoforo kaj iom post iom mi malstreĉiĝis sed longa estis la vojo, malvarma la vespero kaj multnombraj la veturiloj, la motorcikloj, la biciklantoj, la piedirantoj, malkomforta la vojo : kia aventuro !

Antaŭ ol vojaĝi al Nepalo, mi rilatis kun *M.S.Shany*, esperantisto kiu invitis min viziti du lernejojn, kie li instruas esperanton. Per *DVD* mi montris mian regionon - la Sudaj Alpoj - kaj tuj gelernantoj rimarkis similecojn kun partoj de Nepalo. Ĉiam estas plezuro interŝanĝi kun junuloj kaj mi forte kuraĝigis ilin plulerni la internacian lingvon kaj kore invitis ilin viziti la 100an U.K-on en Lillo !

raportis *M. Arnaud*

adiaŭoj
al la instruisto
en *Lipeyani*



adiaŭoj
en *Pokhara*



Paĝo de la komencantoj

teksto en facila Esperanto

Juna fraŭlo deziris skribi leteron al juna fraŭlino. Ĉar li ne sciis, kiel fari tion, li aĉetis leterlibron. Li serĉis en ĝi la leteron, kiun li bezonis, kopiis ĝin kaj sendis ĝin al la fraŭlino. Ĉi tiu, hazarde, havis la saman leterlibron kaj trovis en ĝi la leteron kun la respondo. Kaj ŝi skribis al li nur^(x) ĉi tiujn vortojn: "Estimata sinjoro. Mi ricevis vian leteron. Bonvolu turni la paĝon de via libro kaj vi trovos mian respondon."

(x) : **atentigo**

Ĉu vi bone scias, ke vi devas atenti, kiam vi parolas aŭ skribas, pri la loko de la vorteto **nur** ?

> "ŝi skribis al li **nur ĉi tiujn vortojn**" : signifas, ke ŝi skribis neniun alian vorton.

> "**nur ŝi** skribis al li ĉi tiujn vortojn" : signifus, ke neniua alia persono skribis al la fraŭlo.

> "ŝi **nur skribis** al li ĉi tiujn vortojn" : signifus, ke ŝi nek pensis, nek diris, nek revis... ĉi tiujn vortojn... ŝi nur skribis ilin.

> "ŝi skribis **nur al li** ĉi tiujn vortojn" : signifus, ke ŝi skribis ilin al neniua alia persono... nur al li.

resume : La vorto "**nur**" devas nepre esti antaŭ la vorto koncernata de la nocio "nur". Tio signifas ankaŭ, ke la vortordo en Esperanto ne estas tute libera.



Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de *Esperanto-Info*

solvoj de la demandoj en EP 99 – vintro 2014-2015

1 - gramatika

a : 1 ; b : 3 ; c : 3

2 - vorto-trezora

ĉ 1 : akcento ; ĉ 2 : emfazo ; ĉ 3 : supersigno

d 1 : absolvi ; d 2 : elpagi ; d 3 : kvitanci

plia demandaro

1 - gramatika

a) bone laboras, tiu certe sukcesas.

1 – kio ; 2 – kiu ; 3 – kia

b) Se mi est....., mi farus longan vojaĝon.

1 – as ; 2 – is ; 3 – us

c) Mi deziras, ke vi rest..... en la salono.

1 – us ; 2 – u ; 3 – os

2 – vorto-trezora

ĉ) elektu «ago», «akcio» aŭ «efiko» por traduki la francan «action»

1 – acte :

2 – effet :

3 – en bourse :

d) elektu «dolĉigi», «mildigi» aŭ «stompi» por traduki la francan «adoucir»

1 – atténuer :

2 – la vie :

3 – estomper (dessin) :

(solvoj en la venonta gazeto)

Ĉu vi volas ludi ?

Eble vi jam havis la okazon respondi al demandoj, kiujn nia amiko Jean-François Cousineau kompilis ludforme pri nia lingvo, pri Esperantujo kaj eĉ pri aliaj temoj. Se jes, vi scias, ke li nomis sian ludon " Superzam' "... eĉ se tiu nomo baldaŭ ŝanĝiĝos (ĉu ne, J-F ?)... kaj vi scias ankaŭ, ke tiu ludo ne ĉiam estas facila. Pro tio, tiu "paĝo de la komencantoj" iel iĝas ankaŭ "paĝo de la spertuloj"...

Bone cerbumu kaj provu respondi. Vi trovos la solvojn en la venonta n° de via gazeto.

1. En kioma jaro aperis la internacia lingvo Esperanto ?

a- 1878 b- 1885 c- 1887

2. Kiu verkis la oficiale 1an originalan romanon en Eo :

Kastelo de Prelongo ?

a- Wasniewski b- Valienne c- Baghy

3. El tiuj muzikgrupoj, kiu estas malroka ?

a- Amplifiki b- Persone c- Kajto

4. En kiu jaro naskiĝis Ludoviko Lazaro Zamenhof ?

a- 1849 b- 1859 c- 1869

5. Kiu korelativa finaĵo signas personon ?

a- -u b- -o c- -el

6. En kiu lando estas la plej alta akvofalo en la tuta mondo ?

a- Bocvano b- Kanado c- Venezuelo

Espéranto : utopie naïve ou possible solution linguistique pour l'avenir ?

Il y a quelque temps déjà, José Grammatico m'a envoyé cette information :

«Entendu ce matin dimanche sur France-info entre 5 h 55 et 6 h. Auteur : Claude Durand ; livre : « Rue de Babylone - Éditions de Fallois - Paris ». Il serait question dans ce roman de transmettre aux générations futures un message pour leur situer les sites concernant les enfouissements de déchets radioactifs. Et la langue choisie par l'auteur, c'est l'espéranto. Mais je ne sais pas comment est traitée notre langue dans ce roman publié le 7 mai 2014.»

Voulant en savoir plus, je suis allé voir le site de l'éditeur ; voici ce qui est dit au sujet de cet ouvrage :

Dans cent mille ans, plus tôt peut-être, les déchets nucléaires que nous avons l'imprudence d'enfouir sous terre mettront en danger la planète. Il faudrait prévenir nos lointains successeurs. Leur envoyer un message ? Mais dans quelle langue, puisque toutes celles que nous parlons aujourd'hui auront probablement disparu. Car les langues meurent aussi. Réuni à Paris, rue de Babylone, un collègue d'experts internationaux doit trouver une solution à cet angoissant problème.

C'est l'occasion pour l'auteur d'évoquer toutes les tentatives, des plus sérieuses aux plus loufoques, déployées au cours de l'histoire humaine, pour fabriquer une langue commune à tous, susceptible d'instaurer entre les peuples la paix universelle. Comme si le fait de parler le même idiome n'était pas, au contraire, le plus sûr moyen de ne pas s'entendre, de susciter des disputes, d'en venir aux mains ou aux armes...

Derrière ce divertissement, mi-grave mi-bouffon, est dressé, en forme de réquisitoire ironique, un inventaire des utopies les plus naïves de notre siècle, du principe de précaution poussé à ses extrêmes au gommage des frontières et à l'abolition de la diversité des langues.

Et l'espéranto dans tout ça ? Utopie naïve ou possible solution ? Pour le savoir, je suis allé sur le site de France-Info, où j'ai pu écouter les paroles mêmes de l'auteur Claude Durand, prononcées dans le cadre de l'émission de Philippe Vallet : «Le livre du jour». Voici la fin de son intervention :

«J'ai imaginé une sorte de bouffonnerie langagière. Comment trouver une langue, quelle qu'elle soit, c'est-à-dire pas seulement parlée ? On fait appel à des spécialistes de la langue musicale, de la langue gestuelle, de la langue olfactive, on va réveiller le latin et surtout, on évoque bien sûr l'histoire de la plus belle des langues universelles, c'est-à-dire l'espéranto. [...] Le roman pose le problème de la diversité : est-ce que les hommes – et les femmes – s'entendent mieux en parlant le même langage, ou bien est-ce qu'il n'y a pas plus de chances de bien s'entendre quand on ne se comprend pas ? Ce n'est pas parce qu'un homme ou une femme parlent la même langue qu'ils ne vont pas s'engueuler. En revanche, on peut très bien, par des gestes, fraterniser sans même parler. En tous les cas, il faut préserver la grande diversité des langues. Plus il y aura de langues, mieux on se portera dans le monde entier.»

Beaucoup de questions sont soulevées dans ce texte. Nous savons tous trop bien, hélas, que l'usage d'une langue commune n'est pas la garantie d'une absence de disputes. Mes nombreuses visites sur le site « Libera Folio », pour ne donner que cet exemple, ont contribué à renforcer une conviction que je m'étais forgée depuis bien longtemps.

Avez-vous une opinion à ce sujet, des commentaires à formuler ? Il me serait agréable de leur trouver une petite place dans la prochaine édition d'Espéranto-Provence.

P. Vilain

Espéranto : solution linguistique pour l'Europe ?

"Une grande langue pour les petits peuples". C'est ainsi que la presse italienne parle de l'espéranto. Dans le cadre de l'Union Européenne, de ses 450 millions d'habitants, ses 27 langues officielles et ses 150 langues régionales, il serait bon de chercher quelle solution adopter pour faciliter la communication et donner "une âme" à cette entité.

Pour en savoir plus, lire le bulletin de EEU (Eŭropa Esperanto-Unio) : www.europo.eu

Pour joindre le groupe politique Europe-Démocratie-Espéranto (qui a présenté des candidats lors des dernières élections au Parlement Européen) : www.demokratio.eu

Pour apprendre les langues européennes : www.lingvo.info



El la mesaĝkesto de la legantaro

La gazeta mesaĝkesto denove pleniĝis, je mia ega kontenteco, car mi ŝategas tiajn korespondajn interrilatojn. Dankegon, do, al ĉiuj kontribu/i/o/ntoj ! *(la redaktoro)*

Pierre Oliva

Pli kaj pli estas plezure legi la gazeton ; ĝis kiu nivelo vi povos beligi ĝin ? Gratulon !

respondo de la red.

Dankon, Pierre ! Teknike, mi unue devas enprofundiĝi en ĉiujn arkanon de la programo « Scribus » ; enhave, tio dependas de ĉiuj kontribuontoj.

Renée Triolle

Mi bonorde ricevis ĝin (la gazeton 99)... mi preferas "Esprim-libereco estas fundamenta", anstataŭ "Mi estas Charlie", kio nenion signifas krom aludo al la frazo de Kennedy en Berlino .

respondo de la red.

Via propono, Renée, ŝajnas al mi pli profunda pensprimo ol impresa frapfrazo, kiaj estas « Ich bin ein Berliner » (« Mi estas Berlinano » - Kennedy – 26 an de Junio 1963) kaj « Nous sommes tous Américains » (franca ĵurnalo « Le Monde » – 11an de Septembro 2001). Ĉu vere ili nenion signifas ?

Monique Arnaud

Mi bone ricevis la novan gazeton, rapide tralegis ĝin. Ni certe tutpravis kiam ni elektis vin kiel redaktanton !

respondo de la red.

Dankon, Monique ! Sed permesu, ke mi ne tro fanfaronu, ĉar se mi tion farus, la perfideta Jean-François C. havus pliajn argumentojn por afable min inciteti !

Rose-Marie Quintin

Ne, mi ne estas "Charlie". Oni povas kondolenci, mi kondolencas ĉiujn viktimojn kaj la familiojn de ĈIUJ viktimoj ; sed esperantistoj ne bezonas enmiksiĝi en politikajn aferojn, nome de la federacio. Ĉiu, individue, faru tion se li deziras, sed nome de la federacio, NE. Eble pro tio, en la pasinteco, la "klubo" ne volis aliĝi al iu ajn federacio, sed lasis tiun eblon al siaj klubanoj individue. Pri tio, mi eĉ ne parolos en nia klubo. Hieraŭ, mi pagis mian kotizon, rekte al la kasisto. Trankviliĝu, mi ne koleras kontraŭ iu ajn, mi nur donas al vi mian opinion.

respondo de la red.

Se estus loko en nia gazeto, estus interese havi la opiniojn de la federacianoj pri la « neŭtraleco » - nepraa ŭ ne – de nia movado. Atentu, ke tio, kio vin « ŝokis »,

estis nuraj «vortoj de la prezidanto», tamen laŭ propono mia. Li ja aldonis : «Kaj, sendube ankaŭ ĉiu el vi estas Charlie», kie certe mankis «preskaŭ» inter «ankaŭ» kaj «ĉiuj». Fine : la sama slogano troviĝas (almenaŭ meze de Januaro, kiam mi skribas ĉi vortojn) sur la ĉefpaĝo de la retejo «Espéranto-France».

Josiane kaj Eugène Papciak

Koran dankon pro via interesa bulteno .

respondo de la red.

Dankegon pro tiuj kuraĝigaj vortoj el la Aŭvernja Federacio ! Salutojn el Provenco al ĉiuj viaj samfederacianoj !

Jean-François Cousineau

Dankon pro via denove tre interesa Provenca bulteno (jen plia flataĵo por via egoo !!!) Ĝi efektive estas tiel belaspekta kaj atente lingve kontrolita, ke malfacilas trovi eraron aŭ veran kritikon, eĉ por harfendemulo kiel mi... Gratulon ! (jen plia meritita egooŝveligaĵo !!!) Ĉar mi tamen strebis jam de monatoj por trovi ion por skribi prie (*Philippe Combot* ja pli rapidis kaj efikas ol mi ĉikampe !), mi konfesas tamen ke io tikletas min : ĉu ne estas gramatika eraro en la titolo de la revuo ? (Mi sentas vin ekstremit...) Mi efektive legas "vintro 2014/2015"-n. Ĉu "vintron" aŭ "vintre" ne pli taŭgas ? Ĉibultene, mi anke iel bedaŭras la malĉeeston de artikolo pri temo (humura, stranga, lingva aŭ movada) eksterfederacia... Sed pri tio tre verŝajne kulpas la sufiĉe longa - sed interesa - federacia raporto, ĉu ne ? Bedaŭrinde nur tion mi sukcesis trovi... Eble *Philippe* estos pli sukcesa... Nu, la "paĝo de la komencantoj" estas tre bona ideo... kaj anke la "mesaĝkesto de la legantaro" kiu, estigante ligojn inter la legantoj, plivivigas la bultenon. Tiu rubriko kompreneble multe ŝuldas al viaj personaj reagoj, ĉiam humurplenaj, amikecaj kaj ofte kunfriponaj... (lasta plua egooŝveligaĵo !!!)

respondo de la red.

Longa komento, Jean-François ! Ĉu mi same longe respondu ? Vi tamen bone scias, ke varo tre rara estas por mi la temp' ! Nu... tamen... ĉar estas vi...

Mi respondas inverse al viaj demandoj.

> temo eksterfederacia : mi ŝatus, se estus loko, sed nia gazeto estas unuacele informilo de la federacio kaj ligilo por ĉiuj ties anoj.

> vintro/on/e ? Mi simple tiel pensas : n° 99, (tiu de la vintro 2014/2015. Sed vi eble paraleligas la gramatikan kazon kun, ekz., tiu uzado : « En Nico, je la 17a de Januaro » = « Nikon, la 17an de Januaro ». Ĉu mi rajtas peti priajn argumentojn de la plej gramatikemaj el niaj legantoj ?

> kaj pri la cetero : viaj afablegaj vortoj "dikigis mian kolon" (mia edzino estas ja belgdevena kaj influa !) kaj "ŝveligis miajn maleolojn" (ĉar eĉ kun belga edzino, mi ja restas franco !).



A noter sur votre agenda

dans notre fédération

mai 28-31 - Marseille : semaine de l'espéranto (voir p.4)

juin 14 - Marseille : examen 1er degré de l'Institut Français d'Espéranto (FEI) (voir p.5)

en France

à Kvinpetalo (Bouresse - 86)

avril 20-24 : "ekzercado pri altnivela tradukado" kun Brian Moon

avril 27 - mai 1 : «plurnivela staĝo» kun Ansofi Markov

mai 14-18 : «ĉiĉeronado» kun Anne Amblès

inf. : informoj@kvinpetalo.org - tel : 05 49 03 43 14
ou: 06 07 31 67 81

à Grésillon (Baugé – 49)

avril 17-25 : PRINTEMPaS, cours intensifs avec Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut

avril 25-26 : PRINTEMPaS, examen international d'espéranto conforme au CECRL (B1, B2, C1)

juillet 20-25 : excursions aux châteaux de la Loire avant le congrès mondial

août 1-8 : semaine linguistique, festival linguistique, après le congrès

août 8-16 : semaine festive pour enfants et familles

octobre 17-25 : AŬTUNE, séminaire linguistique avec Christian Rivière.

inf. : Maison Culturelle de l'Espéranto - Château de Grésillon - St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU
tel : 02 41 89 10 34 - kastelo@gresillon.org

juin 6-7 – Toulouse : «instruista staĝo pri rolludoj kaj ties pedagogia uzado».

inf. : <http://www.ins-eo.org/seminario-rolludoj-2015>

Philippe Combot

Dankon pro la bulteno. Mi rimarkis strangan aferon : sur la bulteno, vi diras, ke oni devas fari ĉekon al "Espéranto PACA" (1), sed sur la kuna aliĝilo, oni devas fari la ĉekon al "Fédération Espéranto-Provence" (2).
respondo de la red.

Fakte jes, Philippe, vi tute pravas, mi ne rimarkis tion... kaj antaŭ vi, neniu tion rimarkigis al mi. Kiel vi faras, por havi tiel akrajn okulojn ?! Mi informiĝis ĉe la kasisto ; la taŭga solvo estas nek (1) nek (2) sed... : «Espéranto-Provence».

juillet 20-23 – Bourg-en-Bresse : Stage "Espéranto et Alternatives" avec un professeur coréen, Ana la Rêveuse, et quelques élèves.

juillet 25 - août 1 – Lille : 100ème Congrès Universel

dans le monde

mai 13-16 - La Chaux-de-Fonds (Suisse) : 3ème colloque mondial sur l'enseignement de l'espéranto.
inf. : mirejo.mireille@gmail.com

mai 16-23 - Hameln (Allemagne) : 92ème congrès allemand d'espéranto
inf. : gek2015@esperanto.de

juillet 17-25 - Oostende (Belgique) : 48ème congrès de ILEI
inf. : radojica.petrovic@gamil.com

août 2-9 - Wiesbaden (Allemagne) : congrès international des jeunes (I.J.K.)
inf. : www.facebook.com/junularkongreso

août 8-15 - Nitra (Slovaquie) : congrès de SAT
inf. : www.satesperanto.org

août 10-17 - Sopron (Hongrie) : semaine internationale de la jeunesse (I.J.S.)
inf. : www.ijs.hu

août 22-29 - San Benedetto del Tronto (Italie) : congrès national italien
inf. : kongreso@esperanto.it